

La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 29. – Oktobro – Novembro – Decembro 1994

ISSN 0986 - 1181



Ĉefartikolo

La triobla ĝermo



En mateno de Julio 1887 la juna doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof revenis hejmen, premante sian teknon kontraŭ si. En ĝi kuŝis modesta broŝuro 40-paĝa : temis pri la unua ekzemplero de la "Unua Libro", kiu entenis ĉiujn liajn esperojn. Ĝin li reprenis de la Varsovia Cenzurejo : la Cenzuristo ĵus stampis ĝin kaj almetis sian subskribon post forpaso de la lim-tempo difinita de la Cara administracio. Li ankaŭ donis al Ludoviko la necesan "bileton por eliri", kiu pruvis, ke li ricevis la rajton depreni la jam presitajn librojn el la "Tipo-Litografio Kelter". Urgis al li alveni hejmen, kie atendas lin Klara, lia edzino. Ŝi helpas lin ekspedi la tutan stokon al adreso el la tuta mondo, adreso de longe kolektitaj el plej diversaj fontoj . . .

Ludoviko pro modesteco sin kaŝis sub la nomo de D-ro Esperanto. Li ankaŭ turnis sin al legantoj kun la peto, ke tiuj ne tro zorgu pri la aŭtoro, kiu ja estas nekonata, sed juĝu la enhavon mem de la broŝuro.

En ĝi li donis la grandajn principojn de la nova lingvo : unue, la radikoj estas elektitaj el la ekzistantaj internaciaj vortoj kaj en okazo de dubo estas prenitaj el "duon-internacia lingvo", la Franca. Tio ebligas vastan komprenon. Due, li aranĝis "dismembrigon" de la vortoj per elekto de afiksoj kaj per la fakto, ke ĉiuj elementoj de la lingvo eĉ la gramatikaj troviĝas en la vortaro kaj ĉiam konservas la formon, kiun ili tie havas : ĉiu povos per konsultado de la vortaro kompreni la esprimitan penson sed tio ne eblas per kiu ajn alia lingvo. Plie li donas "Plenan Gramatikon" en 16 reguloj kaj ankaŭ vortaron "por Rusoj" sur granda folio. Estis sekvantaj aliaj folioj "por Francoj", "por Germanoj" . . . Tio fakte estas la ĝermo de nia lingvo : ankoraŭ nun sufichas eksplicite tiujn diversajn elementojn por plene klarigi la lingvon.

Sed li aldonis ekzemplojn al la teorio : li donis ses "specimenajn" tekstojn. Nome, la Kristana preĝo "Patro nia" estis sekvata de peco el la Biblia genezo : ĝi estos bona komparpunkto, ĉar tiu teksto estas ĉiulingve tradukita. La tria "specimeno" estas pli longa : ĝi estas "Letero al amiko", kiu certe miros pro la ricevo de letero en nova, mistera lingvo, akompanita de unufolia vortaro. Poste venas tri poemoj, du originalaj : "Mia penso" kaj "Ho, mia kor'"; la tria estas traduko "El Heine" (En sonĝo principon mi vidis"). Kaj fakte tiuj ses tekstetoj konsistigas la ĝermon de nia literaturo originala aŭ tradukita, proza aŭ poezia, rakonta aŭ filozofia kaj eĉ religia . . .

En tria parto de la broŝuro Zamenhof proponis tre diversajn rimedojn por diskonigi la novan lingvon. Ni povus ankoraŭ hodiaŭ ĉerpi el tiuj konsiloj. La plej aŭdaca sin montris per kvar plenaj paĝoj da blanketoj : la legantoj estis invigitaj subskribi "*promeson ellerni la lingvon, se estos montrite, ke dek milionoj donis saman promeson*". Feliĉe multaj legantoj resendis tiujn promesojn, sed per trastrekita "*senkondiĉe*" : la promeso de baldaŭa enviviĝo de la lingvo estis tiel markita kaj tiu tria parto de la broŝuro fakte estis la ĝermo de nia movado.

Se konkludi en kelkaj vortoj, mi diros ke la 40-paĝa broŝuro de la juna Zamenhof estis la triobla ĝermo de nia lingvo, de nia literaturo kaj de nia movado.

D-ro André ALBAULT



Kroniko de la nuntempo

Jen baldaŭ . . . 1995!

Antaŭ preskaŭ naŭdek jaroj okazis la Unua Universala Esperanto-Kongreso . . .

Kaj la genia "iniciatoro" de la Lingvo Internacia, D-ro Esperanto, proponis – por certigi la estontecon de ĉi tiu freŝfunkcia lingvo – la Kongresan akcepton de "FUNDAMENTO".

Ja por tia sintezo de Indo-Eŭropa radikaro kun Azia aglutin-strukturo – tiam ankoraŭ sen jarcenta literaturo – la "FUNDAMENTO" estis verfakte la marko de la genio des pli, ke, por garantiĝi daŭran efikecon al tia bazo simila al "kromosom-aro" de ĉelnukleo, li proponis kaj voĉdonigis la "Lingvan Komitaton", kiu post 1949 sukcesis ĉiamigi sin en la AKADEMIO de ESPERANTO.

Ĉiu devus pli profunden konscii la valoron de tia institucio, kiu meze de tiom da tempestoj historiaj (kiaj estas la mondmilitoj), sed ankaŭ lingvaj (kiaj estas la diversaj proponoj de novaj "lingvoj" aŭ strangaj kaj kapricaj reformoj) ankaŭ sukcesis ĝis nun konservi iun unuecan evoluon de tia tutmonda lingvo . . .

Post dek jaroj estos solenata la centjariĝo de la Unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-maro . . . La preparo de tia festo estu por ni ĉiuj la okazo primediti, kiom ŝuldas nia lingvo al la genia ideo de la "iniciatoro", kaj konsekvence observi la pravan vojon de la Akademio . . .

J. T.

La Redakcio

esprimas al ĉiu leganto

plej korajn bondezirojn

por la nova jaro 1995 . . .

RESPONDOJ

AL LA PROPONO

de Georgo Kamaĉo pri matematikaj operacioj

Letero de Olav REIERSØL
(Torød, Norvegio, 16 OKT 1994)

La esprimo "one de 9" estas malbona, ĉar ne temas pri ono de 9. Ŝajnas al mi, ke la esprimo fariĝos akceptebla, se ni forigos de kaj skribos 28 one 9. Sed one estas uzebla, nur kiam la dividanto, aŭ "denominatoro", estas entjero.

En mia kajero "Matematika kaj stokastika terminaro Esperanta" (1-a eld. 1987, 2-a eld. 1994) mi proponas jenajn mallongigojn: *mul* = multiplikita per, *div* = dividita per, *fra* = frakci-streko. Anstataŭ la supra esprimo mi skribas aŭ: 28 *div* 9 estas 3 kaj restas 1 aŭ: 28 *fra* 9 estas 3 plus 1 *fra* 9.

Letero de Fernand BOYET
(Angers, Francio, 29 NOV 1994)

En iu antaŭa letero mi bedaŭris, ke en "La Letero de l'Akademio", oni povas legi misuzitan *po*, kaj vi respondis al mi, ke la redaktoro ne deziris ŝanĝi la tekston al li prezentitan, kaj cetere la erarinto neniam prezentis tiun eraron kiel novan regulon.

Mi konsentas kun vi pri la diferenco inter *eraro* kaj *propono de nova regulo*. Teorie la diferenco estas grava, sed praktike ĉiuj lingvistoj klarigas, ke la fonto de vivanta lingvo estas la *uzo*, kaj kiam la eraroj fariĝas sufiĉe multaj en la *uzo*, ili spontane fariĝas nova regulo. (En la etnaj lingvoj tre malofte oni proponas ŝanĝojn, oni nur konstatas *poste*, ke okazis evoluo en la *uzo*). Tial mi daŭre opinias bedaŭrinda la publikigadon en via "Letero" de la eraro de la organizanto de la kolokvo, kaj kelkajn semajnojn poste la saman eraron en "Monato" fare de Istvan Ertl.

Kompreneble tio kondukas min al la propono de Georgo KAMAĈO en la lasta numero de "La Letero", kiun mi legis nur hieraŭ pro diversaj zorgoj...

Bedaŭrinde neniam "IAdEM" publikigis terminaron pri matematiko, kvankam oni anoncis tiun celon en 1974! Nun la altnivelaj matematikistoj diskutas pri tre fakaj terminoj, sed neglektas la simplajn uzojn de la matematikaj terminoj.

Tial mi citos miajn fontojn, kiuj estas: unue la "Plena Ilustrita Vortaro"; due tute malnova libro de 1914 "Inicado Matematika"; trie iu terminaro proponita en 1976 de Pola Esperanto-Asocio (BROISE, KLIMEK, LEBEDEV kaj WERNER); kvare la terminaroj publikigitaj ĉiujare sub la nomo: "La Ja-

ro" kune kun "Monato". (Mi supozas, ke la matematika respondeculo estas S-ro COOL, kiu verkis libron pri la geometriaj terminoj).

Post tiu listo da fontoj mi aldonos miajn personajn rimarkojn, ĉar laŭ mi estas necese zorge distingi la *pure fakan lingvon* de la ĉiutaga uzo nefaka, sed kiu rilatas al la fako.

Mi unue citos praktikan situacion. Dommastrino akceptos tri gastojn. Preparante la manĝeton, ŝi metas po kvar kuketojn sur ĉiun teleron. Se oni nombras adicie la kuketojn, oni notas:

$$4 + 4 + 4 = 12$$

kaj por la multipliko:

$$4 (\text{kuketoj}) \times 3 = 12 \text{ kuketoj.}$$

La nombro (4) de la kuketoj estas la multiplikato, kaj la nombro (3) de la teleroj estas la multiplikanto, dum 12 estas la produkto. Kiam oni dividas la eks-produkton, kiu nun estas dividato, per la sama nombro, kiu nun estas dividanto, oni esprimas la kvocienton per:

$$12 (\text{dividato}) : 3 (\text{dividanto}) = 4 (\text{kvociento})$$

$$12 \text{ kuketoj} : 3 = 4 \text{ kuketoj.}$$

Matematika rimarko: la nombro 12 egale estas kaj 4×3 kaj 3×4 ; pro tio la matematikistoj parolas pri du faktoroj, kies loko en la multipliko ne gravas. Sed en la praktika vivo estas granda diferenco inter tiuj du faktoroj. Ekzemple en la rakonto pri kuketoj: po kvar kuketoj por ĉiu el la tri gastoj tute ne egalas al po tri kuketoj por ĉiuj kvar gastoj. Estas necese distingi la *fakan lingvon*

de la matematiko disde la *praktika lingvo*, kiun oni renkontas en la konkretaj problemoj.

En tiu afero de kuketoj matematike temas pri proporcia rilato inter la nombro de la kuketoj kaj la nombro de la teleroj, kaj la kvociento respondas al proporcia rilato, kiun PIV nomas "raporto". Tial oni povus skribi:

$$12 \text{ kuketoj} : 3 \text{ teleroj} = 4 \text{ (kuketoj/telero)}$$

Tion oni legus: *kiam estas egala distribuo, la nombro de la kuketoj por ĉiu telero estas la kvociento de la nombro de la kuketoj por la nombro de la teleroj.*

Tiu uzo de *per* resendas nin al "PIV", kie oni trovas la esprimon *dividita per*. Tiun esprimon oni jam uzis en 1914, kaj oni retrovas ĝin en "La Jaro". Sed la aŭtoro de tiu terminaro proponas konservi nur "pe" por simpligi la lingvon, kaj tiam oni dirus:

"12 dividita per 3 estas 4"

aŭ

"12 pe 3 estas 4".

(Persone mi ne aprobas tiun proponon de "faka" prepozicio). Oni povas pravigi la uzon de *per*, ĉar kaj la multiplikanto kaj la dividanto estas la *iloj* de tiuj operacioj.

En la sama "La Jaro" oni uzas por la multiplikado "oble", sed oni devas atenti, ke *oble* similas al *foje* kaj devas akompani la multiplikanton sed ne la multiplikaton. En mia supra rakonto de kuketoj disdonitaj *po kvar por ĉiu el la tri gastoj* la esprimo kun *oble* devas esti: *trioble kvar kuketoj estas dekdu kuketoj.*

Oni tuj pensas, ke por la divido oni povas uzi *one* kaj "PIV" resendas de *dividi al onigi*. Sed nun venas la malfacilaĵo, la divido ne ĉiam estas farebla en la aro de la entjeroj: kiam oni disponas pri nur 10 kuketoj, kaj kiam restas tri gastoj, tiam oni devas disrompi la kuketojn en frakciojn, kaj jen aperas la problemo de la divid-streko.

Laŭ mia kono de la matematika uzo (mi estas emerito de jam pluraj jaroj), la tiel nomata *divid-streko* montras la ekzaktan *dividon*. Tio signifas, ke — se *a* kaj *b* estas entjeroj — $a/b \times b = a$. Tio funkcias nur kiam *a* estas *oblo* de *b*. Se mi disdonas *librojn* tiel, ke mi disponas pri 12 libroj, kiujn mi povas disdoni al 5 lernantoj, la disdono okazas jene: mi disdonas 2 librojn al ĉiu lernanto kaj konservas la du, kiuj restas; kaj oni skribas tion matematike:

$$12 \text{ (libroj)} = 2 \text{ (libroj/lernanto)} \times 5 \text{ (lernantoj)} + 2 \text{ (libroj)}$$

12 estas la dividato, 5 la dividanto kaj 2 la kvociento kaj 2 (libroj / lernanto) signifas: *po du libroj por ĉiu lernanto*. Sed mi ne povas diri: "12 one 5 (dividanto) estas 2, ĉar 2 ne

estas la kvinono de 12. *Tre ofte la dividaj estas proksimumaj* kaj la uzo de divid-streko estas malĝustaĵo. Oni tiam uzas la signon ":", sed tiu signo ne povas esti prononcata "one".

Unua konkludo. Kiam temas pri *proksimuma divido*, mi opinias, ke la frazoj devas esti:

1) La (entjera) kvociento de 12 per 5 estas 2 kaj restas 2.

2) La divido de 12 per 5 donas la kvocionton 2 kaj restas 2.

3) La nombro 12 *dividita per* 5 donas (la kvocionton) 2 kaj restas 2.

Responde al la redakcia noto mi opinias, ke la uzo de "one" ne taŭgas. Kiam oni diras, ke 7 kuketoj estas la triono de 21 kuketoj, la sufikso rilatas al la nombro 3, kiu tie estas la dividanto. En la proponita kalkulo: $28 = 9 \times 3 + 1$ la nombro 3 ne estas la *triono*, kaj ankaŭ la nombro 9 ne estas la *naŭono* de la nombro 28.

Kiam temas pri *ekzakta divido*, oni povas uzi la sufikson *-on-* kaj mi uzos la ekzemplon, kiun oni povas legi en "La Jaro"; tiun de la Arkimeda proksimumo de *pi*:

1) La sepono de 22 estas $22/7$ (dudek-du seponoj).

2) La sepono de 22 estas $3 + 1/7$ (tri plus unu sepono).

3) La sepono de 22 estas $3, \overline{142857} \dots$

Atentu, oni nepre ne diru: "tri plus cent kvardek dumil okcent kvindek sep milionoj", ĉar post la divido, kies kvociento estas 7 la resto ne estas nulo sed 1 kaj tre gravas la punktoj dekstre de 142857 kaj la streko super tiu perioda sinsekvo de ciferoj.

Dua studo ne plu matematika sed fizika, kiam temas pri *unuoj*. Oni trovas tiajn nomojn en "La Jaro":

rapido: La "ISO" normigita unuo estas skribita *m/s* kaj la aŭtoro de "La Jaro" proponas "metro en sekundo" = *m/s*;

denso: "kilogramo per kuba metro" = kg/m^3 ;

frekvenco: herco (Hz) estas "pociklo sekunde" = s^{-1} ;

trafluo: "kuba metro en horo" (m^3/h) kaj "litro en horo" (l/h);

surfaca tensio: "neŭtono per metro" = N/m ;

koncentriteco: "molo per kuba metro" = mol/m^3 ;

varmokapacito: "ĵulo per kelvino" = J/K .

Oni konstatas, ke la kvociento montrata per divid-streko (ekzakta kvociento) iafaje esprimiĝas per la prepozicio *per* sed ankaŭ alimaniere : *en kaj po . . . -e*.

Kaj tio resendas min al la propono de Georgo KAMAĈO, kiu proponas la *ĉiaman* uzon de *je*. Iam oni diris, ke post adjektivo la prepozicio estas *je*. Sed poste en "PAG", kiu estas gramatiko baziĝanta sur la uzo, oni montras, ke tre diversaj estas la prepozicioj en la suplementoj de adjektivoj. Kial ne estus same, kiam temas pri distribuo?

La unua ekzemplo de KAMAĈO rilatas al la rapido. Ni ĵus vidis, ke oni povas uzi *en* laŭ la skemo : 60 km en *horo*, oni ankaŭ povus uzi *dum*, ĉar la daŭro de la 60-kilometra movo estas plena *horo*. Persone mi preferas uzi la adverbos : 60 km *hore*, kaj se oni deziras esti tre preciza, venas la esprimo : 60 km *ĉiuhore*.

Por la dua ekzemplo temas pri distribuo de salajro proporcie al la daŭro. La preciza esprimo estas *oni pagas la laboriston po 100 Fr por ĉiu horo de laboro*. Se oni deziras mallongigi la frazon, oni povas diri : *lia salajro estas 100 Fr ĉiuhore*. Kaj por esti pli proksima al la esprimo de S-ro KAMAĈO, mi diras : en tiu entrepreno la laboristoj ricevas laŭhoran pagon (oni pagas ilin, laŭ la nombro de horoj).

Kompreneble, se oni pensas malpli pri la konkreta situacio kaj pli pri la kalkulo, oni

povas diri : por kalkuli la mezan ĉiuhoran rapidon, oni dividas la nombron de la kilometroj *per* la nombro de la horoj; alidire oni dividas la mezuron de la distanco en kilometroj *per* la mezuro de la daŭro en horoj.

Pri la kantileno aludita de S-ro Kamaĉo mi neniam aŭdis kanti pri la divido en la multaj klasoj, kiujn mi profesie vizitis. Kiom oni lernas parkere (ĉu utilas kanti?) tio estas la multiplika tabelo, kaj se mi uzus Esperanton en tia klaso, mi lernigus : 2 oble (foje) 4 estas (kaj ne : faras) 8; 3 oble 4 estas 12; 4 oble 4 estas 16; 5 oble 4 estas 20;

ktp. laŭ la sinsekvaj obloj de 4 (la multiplikato). Kiam oni devas poste dividi (ekzemple 12 : 4) oni *silente* sekvas la liston de la obloj de 4 ĝis la momento, kiam oni renkontas 12. Fakte ekzistas *nur du* operacioj : la adicio kaj la multipliko, sed la subtraho kaj la ekzakta divido estas respektive la inversaj uzoj de la du tabeloj : adicia kaj multiplika. Kompreneble mi aludas al la tabeloj, kiujn oni nomas Franc-lingve "pitagoraj", kiuj estas kvadratformaj, kaj kien oni eniras laŭ la unua linio kaj la unua kolumno . . . tio tute ne estas kantileno.

Lasta matematika rimarko : la metodo de la tabeloj ebligas la kalkulon, kiu ajn estas la bazo de la numerado; tial ĝi estas multe pli inteligenta ol la papaga kantileno prialudita.

Kiam la bazo estas dek :

+	1	2	3	4	5	6	7	8	9	x	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	1	1	2	3	4	5	6	7	8	9
2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	2	2	4	6	8	10	12	14	16	18
3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	3	3	6	9	12	15	18	21	24	27
4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	4	4	8	12	16	20	24	28	32	36
5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	5	5	10	15	20	25	30	35	40	45
6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	6	6	12	18	24	30	36	42	48	54
7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	7	7	14	21	28	35	42	49	56	63
8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	8	8	16	24	32	40	48	56	64	72
9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	9	9	18	27	36	45	54	63	72	81

Kiam la bazo estas (ekzemple) ok :

+	1	2	3	4	5	6	7	x	1	2	3	4	5	6	7
1	2	3	4	5	6	7	10	1	1	2	3	4	5	6	7
2	3	4	5	6	7	10	11	2	2	4	6	10	12	14	16
3	4	5	6	7	10	11	12	3	3	6	11	14	17	22	25
4	5	6	7	10	11	12	13	4	4	10	14	20	24	30	34
5	6	7	10	11	12	13	14	5	5	12	17	24	31	36	43
6	7	10	11	12	13	14	15	6	6	14	22	30	36	44	52
7	10	11	12	13	14	15	16	7	7	16	25	34	43	52	61

La uzado estas tia : laŭ la bazo "dek" por kalkuli la dividon $56 : 8$ mi serĉas ekzemple en la kolumno, kies supro estas 8, la nombron 56 kaj laŭiras la linion ĝis la unua nombro, kiu estas 7. Tial mi povas skribi $56 : 8 = 7$.

Se oni proponas al mi la dividon de 45 per 6, mi serĉas en la kolumno, kies supra nombro estas 6, la nombron 45. *Mi ne trovas ĝin.* Tiam mi serĉas la proksimuman kvocionton kaj la reston. La plej granda nombro, kiu tamen estas malpli granda ol 45 estas 42. Mi laŭiras la linion, kies unua nombro estas 7, kaj mi matematike skribas $45 = 7 \times 6 + 3$, kaj praktike diras : la entjera kvociento de 45 per 6 estas 7 kaj restas 3.

Se la bazo estas "ok" kaj se oni petas de mi la dividon de 27 per 5, mi serĉas en la kolumno, kies supra nombro estas 5, la plej grandan nombron, kiu estas malpli granda ol 27, kaj mi trovas 24. Kiam mi sekvas la linion de 24 maldekstren, mi trovas kape de la linio la nombron 4 kaj pro tio mi povas skribi $27 = 4 \times 5 + 3$, tio estas : laŭ la bazo "ok" la kvociento de 27 per 5 estas 4 kaj restas 3.

Persona rimarko : en Esperanto oni povas nomi la nombrojn, kiuj estas laŭ la bazo ok (dum tio ne eblas en la etnaj lingvoj)! Ekzemple 27 estas *duok sep* kaj oni povas diri : *duok sep minus duok kvar restas tri*. Kompreneble tiu rimarko valoras nur por la bazoj malpli grandaj ol dek.

Konkludo mia pri la kantileno : kiam oni parkeras la tabelojn por la bazo dek sufiĉas uzi la vortojn *plus* por la adicio kaj *oble* por la multipliko. Por la divido, kiu plej ofte ne donas tuj kaj ĉiam ekzaktan kvocionton, la vorto *one* tute ne taŭgas.

Se oni nepre deziras paroli, oni povas diri : *en la nombro 45 (la dividato) kiom oble estas la nombro 6 (la dividanto)*. Kaj kiam oni konstatis, ke 45 ne estas en la kolumno 6, ĉar oni estas trovinta la nombron 7 (proksimuma kvociento), oni povas diri (laŭvoĉe) *sesoble sep estas 42 kaj 42 deprenita de 45 donas la reston tri*.

Skribas legantoj . . .

Letero de Ionel ONET (*Usono, 21 NOV 1994*)

Mi turnas min al vi kun la peto, ke vi klarigu, ĉu okazis antaŭ nelonge iu decido pri la ŝanĝo de nia lingvo, kiu daŭre restas sekreta en tiu ĉi mondparto. Temas pri uzo de akuzativo en subjekto. Por klarigi jen tri ekzemploj kolektitaj ene de la sama semajno (la ĵus pasinta) el tri malsamaj E-periodaĵoj :

En Juna Amiko n-ro 70 (94/3) sur paĝo 2 (linio 2) aperas la jena frazo : "Ni supozas, ke la plimulton de la legantoj ne havis tempon skribi al ni".

En La Letero de l'Akademio n-ro 28 (3/94), sur la unua paĝo (tria alineo de malsupre) la prezidanto de la Akademio skribas : "En La Letero (n-ro 23, p. 2-4) aperas konkretajn informojn pri la Kolokvo."

En Inter Ni n-ro 103, iu Marijo Graca komentas sur la unua paĝo malsupre : "en tiu artikolo aperas la vorton "kateto", uzata kun du signifoj."

Mi petas vin helpi nin forigi la konfuzojn kaŭzitaĵoj de la ĉi-supre menciitaj novaj gramatikaĵoj.

NdIR – Vi pravus rimarki tiajn "pres-koboldojn" . . . Sed laŭ fama diro la "unuan ŝtonon" ĵetu tiu, kiu povas fanfaroni, ke li ĉiam sukcesis eviti ilin dum tajpado! Ja estas granda diferenco inter simpla kaj evidenta tajpo-koboldo, kaj sisteme ripetata eĉ intence farata eraro por modifi ekzistantan regulon per uzado laŭ evidente diskonataĵoj ekzemploj . . .

Letero de Cleber de Moraes Lemos (Brazilo, 30 NOV 1994).

Rilate al la literoj *J* kaj *Ŭ*, pri kiuj tuŝis via numero 28 de JUL – AŬG – SEP /94, mi devas diri, ke laŭ mia opinio ili ne estas konsonantoj aŭ vokaloj aŭ duonkonsonantoj aŭ duonvokaloj. La literoj *J* kaj *Ŭ* estas diftongigiloj.

NdIR – Jen teknika demando por la Fonetika Sekcio de la Akademio.

*

Venis ankaŭ pluraj dank-leteroj . . .

– de la Esperanto-Redakcio de "Radio Vaticana" : *Koran dankon pro la alsendo de via "Letero", kiu respegulas la viglan laboron de tiom grava kaj nobla institucio."*

– de s-ino Iren Strulović (Tel-Aviv, Israelo) : *"Mi kore dankas . . . pro sendo de "La Letero . . . ĝi estas tre interesa specife pro la informoj pri gramatiko kaj klarigoj de la Akademio . . ."*

– de Saulcerite Neilande (Riga, Latvio) : *"Mi sincere dankas . . . ĉiun numeron mi tralegas tre atente, kaj atentis la proponojn eldiritajn en via valora eldonaĵo."*

– de M. Reza Torabi (Irana Esperantista Junulara Organizo – Tehran) : *"Tutĝoje ni ricevis "La Letero"-n, kiu ege plaĉis nin : pro via estiminda ago koran dankon : laŭeble ni petas pluajn informojn pri la Akademio kaj ĝia agado . . . Antaŭ nelonge ni ricevis pakajon adresitan al ni de s-ro William Verch-W kun stranga, almenaŭ al ni, alfabeto . . ."*

NdIR – Estimataj Samideanoj de IREJO, s-ro Verch-W havas nenian rilaton kun la Akademio : lia propono estas nur lia privata afero.

Vivo de la Akademio

Tuj okazos elektado de Akademianoj. Inter la Kandidatoj estas duon-dekduo da novaj. Aliaj estas ĝis-nunaj Akademianoj de la "Eliranta Triono" : ili finis sian naŭjaran mandaton sed ne rifuzis denove kandidati; ili do aŭtomate reprezentiĝas al la balotado. Ĉiuj ricevos voĉojn de la principe 45 ĝisnunaj Akademianoj, inkluzive de la 15 elirantoj.

Ĉiu kandidato respondis al demandaro : pli ampleksa por novuloj, reduktita por eliran-

toj. Pro la jarfinaj festoj la poŝto ofte prokrastas : ni do iom ŝovis la datlimon, unue je la jarfino.

Pasos du monatoj por la balotado. Kaj du aliaj por ke ĉiu debatu pri estontaj Estraraj postenuloj kaj pri la Direktoroj de Sekcioj kaj Komisionoj : principe ili estos samaj, krom se ili rezignas aŭ se la Kolegoj ilin rifuzos. Unu punkto certas : la prezidanto kaj la sekretario ne prezentiĝos por ricevi novan mandaton.

A. A.

"Por plurlingveco de Eŭropo"

En Aŭgusto 1994 aperis libro kun la ĉi-supra titolo en la eldonejo "Akademia Libroservo Berlin & Paderborn". Ĝiaj tekstoj aperas paralele en Esperanto kaj en la Germana (Für Europas Mehrsprachigkeit).

Dr. Werner Bormann montras la integriĝantan Eŭropon estantan "lingve survoje", t.e. "La Eŭropa Unio luktas por sia glata komunikado", kaj en triono de la libro Prof. Dr. Helmar Frank konstatas: "La minacanta kulturkatastrofo provokas la Eŭropan eliton al kvinlingveco", per kio li prezentas "Prospektivon disan de la optimisma fatalismo de Werner Bormann". Tial la libro de la du aŭtoroj deklaras sin "Disputo pri argumentoj".

Werner Bormann priskribas strukturon, funkciadon, kutimojn kaj estontecon de la Eŭropa Unio, ĝenerale kaj koncerne ĝiajn lingvojn. Li antaŭvidas evoluon kun daŭra uzo de ĉiuj Uniaj lingvoj, sed multaj laŭokazaj neglektoj de iuj el ili. Tiu fortranĉado de lingvoj el ĉiea aplikado plej malmulte trafas la Anglan kaj la Francan (iom ankaŭ la Germanan). Per tiuj reduktaj en la lingvouzo enŝoviĝas laborlingvoj, ne jure sed simple fakte. La ekzisto de tiu kategorio de lingvoj malfermas la eblon por Esperanto, ke ankaŭ ĝi povos plenumi tiun servon, fariĝante (aldona) laborlingvo.

Helmar Frank vidas fortan koncentriĝon al la Angla lingvo, sed ne al ties altkultura formo. Regos interkompreniga surogatlingvo, nedefinita slango nur de fore Angleca, "fuzzy English" = proksimuma Angla. Ĝia rapide akirita monopolo degenerados. Dume la Internacia Lingvo gajnos kreskantan signifon kaj longperiode solvos demokratie la komunikadan problemon en Eŭropo.

LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO. Trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. — *Redaktoro*: Jean THIERRY. — *Direktoro de la publikaĵo*: André BOURDEAUX. — *Presejo*: COCONNIER, 72300 SABLÉ. — *C.P.P.*: n-ro 6971. — *Prezo*: 1 n-ro: 40 FRE — *Jara abono*: 120 FRE — *Pagebla*: ĉe kontoj: Banka: Crédit Lyonnais n-ro 7090 F — Poŝtĉeka: 735 27 B Paris. — UEA: Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (girofiĉejo Den Haag): nepre indiku "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto" (40 gld).

Perantoj por diversaj landoj:

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Post Office Box 230, MATRAVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

Azio (tuta): S-ro UMEDA Yosimi, I.R.O.B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Benelukso: Eldonejo kaj Librejo SONOPRILO, Doornstraat 22,

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo: ScS Ed Jockey Club — Sala 103, BR 70300 BRASILIA DF (Caixa Postal 11 11 05), Brazilo.

Germanio: S-ro Claus J. GÜNKEL, Postfach 100447, D 41704 VIERSEN, Germanio. — Poŝtgiro Hannover (bankkodo 250 100 30), konto-n-ro 5706 31-301 (36 DM).

Kubo: S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-o-Redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

Meksiko: S-ro Enrique LEMUS Rodriguez, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DE Meksiko.

Rusio: D-ro Sergey N. KUZNETSOV, Semashko 1/12 RUS 103009 MOSKVO.

Svedio: Sveda Esperanta Federacio: c/o Lisbet ANDREASSON, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono: Eldonejo Bero: PO.Box 13492, BERKELEY CA 94712, Usono (23 \$).